

& La landlimo:

< Rekante 21 el 29 batoj por strofo, entute 464 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtejn. Komponis kaj aldonis rekantaĵon Martin Strid (2015).>

(#Melodio:

<:29> (

/MiSi LaaLaSi LaaSiLa Tido; LaTi doodoTi LaaLaTi SiMi;

(#Rekantaĵe: MiSi LaLa LaSi LaTi do Ti; So TilSo Mi FaSo LaSo LaTi; do Ti TiTi So TilSo La La La a)

)×16)+

(&Strofoj:

'1 Kiel vica stultaĵ' sed ne timo, ; venas nokte la latva landlimo

(×: **En la mondon venis nova sento ; Nin di2sigas obstinaj baroj ; Trovu mian mano2n en la ĉen'**.)

'2 per vekado far uniformitoj – ; ven' subita de l' homoj subitaj.

'3 Tiuj uniformitoj senŝerce ; sian taskon plenumas ekserĉe,

'4 kaj valizojn prezentas sen volo ; vekiginta vagona popolo.

'5 Miaŭas kato, benante la sorton – ; l' kato havas litovan pasporton,

'6 do vojaĝas sen peti pri vizo ; en plektita korbet', ĉe valizo.

'7 Grumblas avo, montrante naivon: ; Damne, mi liberigis Latvion,

'8 eĉ vundita mi estis ĉe Ventspils... ; ĉu vi novan militon komencis?

'9 Katmastrino replikas al tio: ; Vi alvenis por okupacio!

'10 nur dum lastaj dek jaroj, ververe, ; ni finfine ekvivis libere!

'11 La disput' doganistojn ne tentas, ; ili nur pri valizoj atentis,

'12 kaj flavbeka serĝent' senmalice ; lerte stampas pasportojn laŭvice.

'13 Miaŭas kat', avo paŭtas kun tristo, ; kaj meditas mi, esperantisto,

'14 pri la baroj obstinaj, doloraj, ; plustarantaj en kapoj kaj koroj.

'15 Ili pro l' sankta am' ne dissaltas, ; ili feras, betonas, asfaltas,

'16 ĉe okaz' agreseme ekprancas... ; Miaŭas kato. Nur al ĝi bonŝancas.)